

August Heinrich Hoffmann,  
Restu ni en nia rond'

*tradukita de Bernd Hasecke*

Restu ni en nia rond',  
Morgaŭ marŝu tra la mond',  
Kaj ni migri devas, devas  
Nur pri hejmo revas.

Longa estas la vagad'  
Tra la landoj sen restad'.  
En la mond' ni spiros, spiros,  
Ne al hejm' reiros.

.....  
.....  
.....  
.....

Knabino alridas min,  
Vokas eĉ: "Mi amas vin!"  
Restus ni kun ĝojo, ĝojo,  
Logas ja la vojo.<sup>2</sup>

Libervivon gvidas ni  
Kaj manĝaĵon donas Di'.  
Kampo estas domo, domo  
Por vaganta homo.

*Traduko de la Germana poemo "Heut noch sind wir hier zu Haus" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, \*1798-04-02 - †1874-01-19) en Esperanton de BERND HASECKE (\*1928-12.29 - †2008-02-05).*

*Arg-1001-2025 (2014-05-03 20:05:42)*

*Esperantigis: Bernd Hasecke (\*29.12.1928; Kirchstr. 17c, D-42553 Velbert, Germanio). S-ro Bernd Hasecke estis delegito de UEA. Li mortis la 5-an de Februaro 2008 laŭ reta informo de lia filo Jan Ulrich Hasecke, Schubertstr. 4, D-42791 Solingen, Germanio.*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis en 2008-03 tiun tradukon de s-ano Anton Kronshage, Eulenweg 27, D-58332 Schwelm, Germanio, tel. 0049-(0)2336-12091. La muziknotoj de la melodio troviĝas en [http://www.lieder-archiv.de/heut\\_no\\_h\\_sind\\_wir\\_hier\\_zu\\_haus-notenblatt\\_300150.html](http://www.lieder-archiv.de/heut_no_h_sind_wir_hier_zu_haus-notenblatt_300150.html).*

---

<sup>2</sup>S-ano Bernd Hasecke tradukis jene:  
Logas jes la vojo.